

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 4 (83) aŭgusto 2014



en la numero

*Boris Koker rakontas pri sia vivo
TEMoj – impresoj de la organizantoj
kial kaj kiel verki scienc-popularajn librojn en Esperanto?
Belartaj Konkursoj kaj aliaj E-premioj
tria tutmonda Konferenco pri instruado de Esperanto
aperis ruslingva “Historio de aplikado de Esperanto en Rusio”*

Moskvo, 2014

BORIS KOLKER

MIA VIVO EN ESPERANTO-LANDO

LA SUNA MOLDAVIO

Mi naskiĝis la 15-an de julio 1939 en Tiraspol (Moldavio, Sovet-Unio; nun la ĉefurbo de Transdnestrio). Dum la Dua mondmilito nia familio, fuĝante de nazioj, evakuiĝis en Uzbekion. En la jaroj 1944-65 mi loĝis en Kiŝinev, la ĉefurbo de Moldavio. En la jaro 1956 okazis du gravaj eventoj: mi eksciis pri Esperanto el la ruslingva versio de la revuo “*Pollando*” kaj finis la faman mezlernejon № 3. En la jaro 1957 okazis du aliaj gravaj eventoj: mi studentiĝis en la pedagogia instituto (supera lernejo) de Tiraspol pri la specialecoj “rusa lingvo, literaturo kaj franca lingvo” kaj ek-lernis memstare Esperanton per la libreto de Nikolaj Andrejev, kiu enhavis nur koncizan gramatikon kaj du vortaretojn. Ĉar mi ne sciis, ke Esperanton necesas lerni du horojn en semajno (kiel oni kutime faris en kursoj), mi dediĉis al tio la tutan haveblan tempon. Rezulte post du monatoj mi ekgvidis mian unuan kurson de Esperanto per pollingva lernolibreto de Leo Turno (la polan lingvon mi komprenis nur iom) kaj instruante lernis mem. Ljudomir Sobanski (Ukrainio, poste Litovio) estis la unua persono, kiu helpis min per lernolibroj kaj gazetoj. Eĉ pli gravaj du eventoj okazis en la jaro 1959: printempe mi edziĝis al Esther (tiam konata per voknomo Fira), al kiu mi pli frue instruis Esperanton, kaj fine de la jaro naskiĝis nia filino, denaska esperantistino, kun bela esperantlingva nomo Bela. Malnovaj esperantistoj memoras ŝin, ĉar ŝi partoprenis kelkajn Esperanto-tendarojn kaj Volgo-Uralajn renkontiĝojn. Krome en januaro 1959 okazis en Odeso la unua por mi kaj por Vladimir Samodaj longa kaj serioza konversacio en Esperanto. Samtempe mi konatiĝis kun Anatolo Gonĉarov, tiam vizitanto de elementa Esperanto-kurso de Tigran Peŝtimalĝan, armeno repatriiĝinta el



unuĵara esperantisto, 1958

Bulgario. En la jaro 1960 okazis eĉ kvar gravaj eventoj. Unue, mi verkis ampleksan studentan studon pri la problemo de internacia lingvo (sub scienca gvidado de akademiano Paul Ariste); due, mi partoprenis la 2-an Baltan Esperanto-tendaron (BET-2) en Estonio, kie mi fondis tendaran universitaton per tri prelegoj laŭ tiu mia verko; trie, nia familio transloĝiĝis en Kiŝinevon, kie ni daŭrigis la studadon en la ŝtata universitato kaj mi finis ĝin en 1962. Kaj kvare, en la jaro 1960 mi enrigardis lernolibron de la angla lingvo kaj mire notis, ke kun scio de Esperanto kaj de la franca lingvo, la angla lingvo estas sufiĉe facile lernebla. Tial mi rapide trastudis la bazon de la angla lingvo, samvoje enprofundiĝis en la moldavan/rumanan lingvon, kiu leksike proksimas al Esperanto, kaj flue ekparolis ĝin. Post la universitato mi laboris kiel bibliografo en la fremdlingva fako de la Respublika biblioteko de Moldavio. Krom instrui tie Esperanton, mi kreis ĉe la biblioteko kaj gvidis Internacian klubon kun esperantlingva nomo “*Mondo*”, kies ĉiumonataj kunsidoj finiĝadis per kunvenoj de esperantistoj.

LA FROSTA URALO

La unua elmigrado de nia familio daŭris 28 jarojn (1965-1993). Serĉante pli bonajn laborojn kaj loĝkondiĉojn, ni forlasis la sunan Moldavion, kie pasis niaj infaneco kaj juneco, kie restis la gepatroj, parencoj, amikoj, kolegoj kaj konatoj, kaj forveturis al la fora, frosta Uralo, en Baŝkirion, kie ni konis nenion. Du jarojn ni loĝis en la urbeto Birsĉk, kiu baldaŭ iĝis konata inter sovetaĵaj esperantistoj pro la nova aktiva Esperanto-grupo. La ceterajn 26 jarojn ni pasigis en la granda urbo Ufa, la ĉefurbo de Baŝkirio. Mi instruis en la fremdlingvaj fakultatoj de

la pedagogiaj institutoj la lingvosciencojn (kun unu lekcio plene dediĉita al la interlingvistiko), la francan kaj latinan lingvojn. Kompreneble, la scio de Esperanto ebligis al mi rapide enprofundiĝi en la latinan kaj interese prezenti ĝin al miaj studentoj. Dum



en ĵurio de la belarta konkurso Liro-1979

unu jaro mi instruis al studentoj-filologoj de la universitato specialan kurson de interlingvistiko. Mia edzino Esther laboris en la pedagogia kaj aviada institutoj, instruante matematikon kaj fizikon. Poste ŝi transiris en matematikan



REVU-8, Salavat, 1974

mezlernejon. Same kiel mi, ŝi gvidis Esperanto-kursojn; inter ŝiaj lernintoj estis konataj rusiaj esperantistoj, estontaj docentoj Nina Cvileneva kaj Nikolao Ŝigajev. Ni klopodis, ke pli-malpli ĉiuj niaj esperantistoj gvidu kursojn. Tial la Ufa Esperanto-klubo rapide kreskis kaj fortiĝis, ofte okupante premiajn lokojn en la tutlanda konkurado de Esperanto-kluboj. Kiel ni instruis, se mankis lernolibroj de Esperanto? Mi akiris kompletan de materialoj por Cseh-metodo, fotis ilin kaj disdonis al ĉiu kursgvindanto kopion de la materialoj. La instruado per Cseh-metodo pruviĝis alloga kaj tre efika. En majo 1968 mi organizis en Ufa la unuan Volgo-Uralan renkontiĝon, kiu fariĝis tradicia, okazante dufoje ĉiujare sub la nomo REVU (Renkontiĝo de esperantistoj de Volgo kaj Uralo). (Noto por la historio: la nomon REVU aŭtoris Viktor Laptev el Ĉelabinsk.) En la jaro 1970 la jam forta Ufa Esperanto-klubo organizis sub mia gvido en Kuŝnarenkovo (Baŝkirio) la tendaron SEJT-12 (SEJT – Sovetia Esperantista Junulara Tendaro).

La rusa scienc-teknika terminologio enhavas amason da maloftaj vortoj, pruntitaj el eŭropaj lingvoj kaj konataj precipe al fakuloj. Plimulto el ili parencas al oftaj Es-



premio al Ufa E-klubo por la 1-a loko en konkurado

perantaj vortoj. Tial mi notis, ke mi facile komprenas signifojn de multaj maloftaj terminoj de la rusa lingvo. Tio venigis min al la penso provi miajn fortojn en scienc-teknika tradukado. Mi komencis fari tradukojn el la angla kaj romidaj lingvoj en la rusan laŭmende kiel kromlaboron. Kompreneble, Esperanto ofte helpis min kompreni nuancojn de signifoj de terminoj. En la jaro 1969 mi definitive transiris al la laboro de tradukisto, komence pri sociologio. Poste dum tri jaroj mi laboris kiel interpretisto kun teknikistoj de la franca aŭtomobila kompanio Renault (Reno), kiu konstruis en Ufa uzinon de aŭtomobilaj motoroj. Kaj la lastajn 20 jarojn en Ufa mi estris tradukan servon en granda scienc-esplora instituto de nafta geofiziko. Krome mi tradukadis laŭmende pri plej diversaj fakoj.

IAM FORA SED NUN PROKSIMA USONO

La dua elmigrado de nia familio komenciĝis en la jaro 1993 kaj daŭras ĝis nun. Ni forlasis Rusion kaj ekloĝis en la usona urbo Cleveland (Klivelnd), subŝtato Ohio. Kvankam mi estis jam 54-jara, mi ne pensis, ke mi havos grandajn problemojn trovi bonan laboron: ja mi sufiĉe bone regis la anglan lingvon, havis doktoran gradon pri lingvoscienco kaj estis sperta tradukisto de scienc-teknika literaturo; krome, en Usono estis multe da esperantistoj, kiuj, mi supozis, helpos min, se necese, trovi iun decan laboron. Ho ve, ho ve! Pro la fino de la “malvarma milito” la usonaj universitatoj reduktis instruadon de la rusa lingvo al minimumo. Dufoje mi instruis Esperanton en someraj kursoj ĉe universitatoj en San-Francisko kaj Hartford; kvankam mi estis pripagita tre bone, tio estis unufojaj mallongaj laboroj. Iu konata lingvisto-profesoro-esperantisto eĉ konsilis al mi serĉi laboron de oficeja purigisto. Evidentiĝis, ke, malsame al Rusio, scienc-teknika tradukado estas malmulte praktikata en Usono: usonaj fakuloj preskaŭ ne interesiĝas pri neanglalingvaj publikaĵoj. Komence de la jaro 1994 mi aĉetis komputilon kaj rapide lernis uzi ĝin por preparo de tradukoj, interreto kaj pri-Esperantaj aferoj. Kaj traduka laboro venis; nun el la rusa lingvo en la anglan – jen plurfoje por NASA (agentejo pri kosmaj esploroj), jen por aliaj organizaĵoj, juĝejoj,



siĝas pri neanglalingvaj publikaĵoj. Komence de la jaro 1994 mi aĉetis komputilon kaj rapide lernis uzi ĝin por preparo de tradukoj, interreto kaj pri-Esperantaj aferoj. Kaj traduka laboro venis; nun el la rusa lingvo en la anglan – jen plurfoje por NASA (agentejo pri kosmaj esploroj), jen por aliaj organizaĵoj, juĝejoj,

advokatoj ktp. Tamen tio estis nur okazaj laboretoj. Fine mi trovis simplan, modeste pripagatan officejan laboron en granda advokata firmao, kie mi pasigis pli ol kvar jarojn. Nia filino Bela kaj ŝia edzo Leo fondis malgrandan komputilan firmaon kaj invitis min esti estro de la oficejo. Tiun agrablan laboron mi plezure plenumis ĝis la emeritiĝo. Komprenoble, tiuj kaj aliaj zorgoj lasis al mi malpli da tempo por okupiĝi pri Esperanto. Ekde la jaro 1996 mi fariĝis redaktoro pri libroj por la gazeto “*Monato*”, kie mi redaktis ĝis nun pli ol 500 recenzojn. Mi partoprenis kaj prelegis aŭ publike parolis en 3 landaj Esperanto-kongresoj kaj en usona-kanada renkontiĝo. Kiam nia materiala situacio stabiliĝis, mia edzino Esther kaj mi vojaĝis enlande kaj eksterlande, precipe partoprenante Universalajn Kongresojn (Israelo, Brazilo, Ĉinio, Litovio, Japanio). Malgraŭ la malfacila komenca periodo de adaptiĝo, nia familio estas tre kontenta pri sia vivo en Usono. Krom la nepoj Aleksandro kaj Eŭgeno, kiuj venis el Rusio, en Usono naskiĝis nia nepino Michelle (nun 14-jaraĝa) kaj du niaj pranepoj – Adamo kaj Mateo. Fine de tiu pri-usona ĉapitreto jen malgaja noto. Dum mia 35-jara Esperanto-agado en Sovet-Unio ĉe mi kolektiĝis tre granda Esperanto-biblioteko kaj amasiĝis granda Esperanto-arkivo. La plej valorajn librojn mi transsendis en Usonon. La aliajn mi disdonacis aŭ vendis kontraŭ eta prezo. Ĉar neniu ufano povis transpreni mian arkivon por konservado, venis Aleksandro Kogan kaj forveturigis ĝin en Peterburgon. Tie ĝi estis tenata dum jaroj en la ejo de klubo “*Espero*”. Sed kiam la klubo perdis la ejon, mian arkivon la klubgvidantoj forĵetis en rubejon, dispreninte belajn diverslandajn bildkartojn. Nu, kion fari! Gravas, ke ni mem vivas (dume), sed la paperoj estas nur malforta reflekto de nia vivo.

INTERLIGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

Komence de la jaro 1962 mi konatiĝis en la Instituto de lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj de USSR en Moskvo kun profesoro Jevgenij



kunsido de la Akademio de Esperanto, 90-a UK, Vilnius, 2005

Bokarjov kaj interkonsentis, ke mi provu aliĝi al la aspiranturo (doktoriga studejo) ĉe la Instituto. Li pretis esti mia scienca gvidanto. Mi verkis por tio interlingvistikan studon kaj provis. Provis mi kelkfoje, sed ĉiam la disponebla loko en la aspiranturo evidentiĝis destinita (formale aŭ neformale) por iu alia. Intertempe mi sukcesis plenumi ĉiujn ekzamenojn, necesajn por prezento de disertacio, prelegis en lingvistaj konferencoj, publikigis artikolojn, sed ŝanco trafi en aspiranturon plu forestis. Kaj kiam mi perdis esperon kaj ĉesis okupiĝi pri la afero, la sorto subite ekridetis al mi, prezentante ŝancon studi en tiu aspiranturo koresponde laŭ la specialeco “ĝenerala lingvoscienco”. Kvankam mi estis jam 42-jara, mi decidis provi. Jevgenij Bokarjov ne plu estis vivanta. Sed profesoro Magomet Isajev konsentis esti mia scienca gvidanto. Mi elektis la temon “*Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto*”. Magomet Isajev diris al mi: “Vi scias pri la temo pli bone ol mi. Do mi ne povos helpi vin tiurilate. Laboru mem. Sed kiam venos la tempo por defendo de la disertacio, mi donos al vi praktikajn konsilojn, kiel aranĝi la referaĵon kaj prezenti la raporton, kiel konduki dum la defendo”. Kaj vere, tiuj liaj konsiloj estis valoraj. La 25-an de aprilo 1985 mi sukcese defendis doktoran disertacion en la Speciala disertacia Konsilio ĉe la Instituto de lingvoscienco, konsistanta el famaj lingvistoj. Mi notu, ke la sovetia/rusia scienca grado “kandidato de sciencoj” (kiun mi ricevis) konformas al la eŭropa grado “doktoro de sciencoj”.

Meze de la jaro 1991 mi petis al fama esperantologo, iama Prezidanto de la Akademio de Esperanto profesoro Gaston Waringhien (kun kiu mi havis korespondadon dum multaj jaroj) kandidatigi min en la Akademion, kion li afable faris. Pli ol dek akademianoj subtenis la kandidatigon. Kaj en la jaro 1992 mi elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto. Mi aktive partoprenas ne nur ĝeneralajn diskutojn kaj decidojn, sed ankaŭ laboras en la sekcioj Ĝenerala Vortaro kaj Lingva Konsultejo. Dum 3 jaroj mi estis Direktoro de la Lingva Konsultejo. Kun mia subteno en la Akademion membriĝis pluraj valoraj personoj. Mi estis reelektita en la Akademion en la jaroj 2001 kaj 2010.




kun Aleksandr Strautmanis en BET-2, Estonio, 1960

ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ EN SOVETIO KAJ RUSIO

Mi venis en Esperantujon 20 jarojn post la komenco de frakaso kaj mortigo de Esperanto-movado en Sovet-Unio dum la tempo de la diktatoro Stalin. Tiam ankoraŭ validis cenzura malpermeso pri pozitiva mencio de Esperanto en la gazetaro kaj libroj (tiu malpermeso estis formale forigita nur fine de la jaro 1969). Ne estas loko ĉi tie por klarigi detalojn. Mi diru nur, ke en la socio ekregis odoro de libero, kiun alportis la “degelo” de Ĥruŝĉov. En tiuj kondiĉoj estis kreita SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), kies unua estraro konsistis el Anatolo Gonĉarov, Vladimir Samodaj kaj Boris Kolker. (Noto por la historio: la nomon SEJM aŭtoris Vladimir Samodaj; mi aŭtoris la nomon SEJT – Sovetia Esperantista Junulara Tendaro.)

Sufiĉe rapide
SEJM fariĝis
amasa kaj tre
agema organizaĵo.
Kvankam ĝi ne
povis oficiale regi-
striĝi, ĝi organi-
zitis tendarojn kaj
regionajn renkon-
tiĝojn, eldonis
gazetojn ktp.
Kutime dum ten-
daroj mi gvidis
paroligajn kursojn
kaj akceptis
ekzamenojn en



*elektita Prezidanto de SEJM, kun la komitatanoj, SEJT-13,
Kievo, 1971*

ĉiuj grupoj. Mi estis kungvidanto de SEJM kaj de la sekvintaj landaj organizaĵoj: ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio) kaj kutime respondecis pri informado kaj pri instruado de Esperanto. (Plia noto por la historio: mi iniciatis kreon de REU kaj proponis ĝian nomon.) Mi kaj Boris Tokarev estis organizintoj kaj gvidantoj de ĈAK (Ĉefa Atesta Komisiono), kiu akceptis instru-raĵtigajn ekzamenojn. Estas amuze, ke kvankam mia subskribo staras sur miloj da atestiloj, mi mem havas neniun atestilon, eĉ ne pri fino de elementa kurso. Intereseĝaj detaloj pri la sovetia Esperanto-movado legeblas en “*Rememora-anekdota intervjuo-konversacio kun Boris Kolker kaj Anatolo Gonĉarov, preparita de Andreas Künzli*” en la gazeto

“*Spegulo*”: <<http://e-novosti.info/forumo/viewtopic.php?t=5124>>¹.

Mi citu nur jenon, kion mi diris en tiu intervjuo: “Por klarigi la sintenon de sovetiaj oficialuloj al Esperanto, jen amuza anekdoto. Dum dek jaroj de ASE mi havis tri longajn personajn konversaciojn kun Miĥail Peslak, vicprezidanto de SSOD (Unio de sovetiaj societoj de amikeco kun eksterlando), al kiu apartenis ASE. Cetere, kiel diris al mi Ruben Saakov, la fakestro respondeca pri ASE, mia samizdata Esperanto-lernolibro estis ‘surtabla libro’ de Peslak, kio signifas, ke ĝi ĉiam kuŝis sur lia tablo (kia honoro!). Do jen. Subite dum la lasta konversacio Peslak prenas de sur sia tablo tre malnovan gazeton (originalon! – eble el la mezo de la 20-aj jaroj) kun artikolo de Nadeĵda Krupskaja (la edzino de Lenin) kaj citas al mi tion, kion mi ja iam legis en Lenin-biblioteko: pri ŝia negativa pritakso de Esperanto. Kaj li solene deklaras: “Jen vidu! La edzino kaj kunbatalantino de la Gvidanto estis kontraŭ Esperanto. Sed ni ja permesas al vi okupiĝi pri tio!””. Tiu lasta konversacio okazis en la jaro 1984. Interalie, proksima parenco de Miĥail Peslak skribis en sia libro de rememoroj, ke Miĥail Peslak estis generalo de KGB.



OkSEJT-26, Armenio, 1984

AMASAJ KORESPONDAJ KURSOJ

Ni povis instrui Esperanton precipe en la urboj, kie ekzistis kluboj aŭ aktivuloj. Sed kio pri la vastega lando? Por tio mi kreis amasan korespondan kurson, kiu funkciis de februaro 1970 ĝis majo 1993. Ĉar mankis lernolibroj por ruslingvanoj (ho ve!), dum tri unuaj jaroj mi instruis per SAT-lernolibro “Petro”. Kaj poste mi verkis mian propran lernolibron. Sed pri tio mi rakontu aparte. Estis tre facile tiutempe publikigi artikolojn pri Esperanto en lokaj ĵurnaloj. Kaj da ili mi publikigis amason kun indiko de nia kluba poŝta adreso. Mi klopodis ekhavi korespondajn lernantojn en ĉiuj respublikoj kaj provincoj de Sovet-Unio, en ĉiuj “ursaj anguloj”: ekstrema ĉe-Arkta Nordo, Ĉukotko, dezerto Kizil-Kum, Kamĉatko, insuloj de Fora Oriento kaj simile. Mi venadis hejmen post la laboro kaj ĝis la malfrua


¹ Represita en *REGo*, № 6 (49), decembro 2008. Vidu ankaŭ la reeĥojn en *REGo*, № 1 (50), februaro 2009. – La red.

nokto kontroladis lecionojn. Dum 23 jaroj mi forsendis atestilojn al 883 kursfinintoj. Vidante tiun sukceson, kelkaj aliaj personoj organizis siajn amasajn korespondajn kursojn: mia kuzo Danielo Kolker, Meri Abolskaja, Anatolo Gončarov kaj Irina Gončarova, Vladislav Zibenkes, Mikaelo Ĉertilov, Kooperativo “Kopso”, Aleksandr Korĵenkov kaj Galina Goreckaja, Viktor Kudrjavcev. Ofte en la korespondaj kursoj oni instruis per mia lernolibro. Ankaŭ nun, dum pli ol 10 jaroj, en la Interreto funkcias amasa distanca kurso, kiun gvidas per mia lernolibro grupo de entuziasmaj volontuloj: <<http://groups.yahoo.com/group/esperanto-kurso/>>. Miloj da homoj, inter ili du membroj de la Akademio de Esperanto, konsideras min sia Esperanto-instruisto, ĉar ili lernis Esperanton aŭ perfektigis en Esperanto per miaj lernolibroj, presitaj aŭ enretigitaj.

UNUA MIRAKLO – LERNOLIBRO POR RUSLINGVANOJ

Mi kredas je mirakloj. Mi kredas, ke ili estas efektiveblaj, se oni tre deziras kaj klopodas ilin okazigi. La apero kaj vivo de mia lernolibro de la unua kaj dua niveloj estas la unua miraklo, kiun mi kreis. Komence de la jaro 1973 mi eklaboris pri mia lernolibro. Unue, mi trarigardis mian riĉan kolekton de Esperanto-lernolibroj el diversaj landoj. Due, mi kompilis specon de oftec-listo, kiun mi klopodis sekvi laŭ lecionoj. Trie, mi pripensis ĉefajn ideojn pri la lernolibro. Nu, kaj poste sekvis la plej facila afero: la verkado. La lecionoj komence aperis en la porjunulara ĵurnalo de Baŝkirio “*Leninec*”. Poste mi sukcesis presigi la libron (sencenzure!) en Ufa multfoje, kaj multfoje ĝi estis (re)presita en diversaj urboj de Sovet-Unio: Krasnojarsk, Kujbiŝev (Samara), Uljanovsk, Jekaterinburg, Rostov-na-Donu, Vladivostok, Soĉi, Tallinn, Kaunas, Duŝanbe, Tiraspol. Venis novaj tempoj, kaj (kiu povus tion imagi!) en la jaro 1992 mia lernolibro aperis en la eldonejo de la Akademio de Sciencoj de USSR “Nauka”. Gravan organizan helpon por tio mi ricevis de Magomet Isajev kaj Nikolaj Zubkov, redaktoran helpon – de Viktoro Aroloviĉ. La tempesta kaj eĉ nekredebla aventuro de tiu lernolibro estas rakontita sub la titolo “*Sovetia lernolibro trompis la cenzuron*”: <<http://www.liberafolio.org/2005/aperis/cenzurlibro/>>.

Nun mia lernolibro troviĝas en multaj retejoj esperantistaj kaj neesper-



antistaj, de kie ĝi estas kopiebla kaj elŝutebla. Kaj fine, la Moskva eldonejo “Impeto” publikigis en la jaroj 2007, 2009 kaj 2012 luksajn eldonojn sub la titolo “Internacia lingvo Esperanto. Plena lernolibro”: <<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7800>>. La rolon de la eldonintoj Aleksandro kaj Jelena Ŝevĉenko estas malfacile supertaksi. Ĉefaj apartaĵoj de la lernolibro, kiuj faris ĝin longvivulo pli ol 40-jara: 1) speciala atento al la internacia leksiko, kio ebligas jam en la komenco de studado asimili grandan materialon; 2) ripetigado de plej oftaj vort-elementoj; 3) emfaza atento al vortfarado; 4) konstanta trejnado pri uzo de prepozicioj; 5) saturiteco per proverboj kaj aforismoj; 6) evoluigo de memstara pensado kaj kapablo trovi eliron el neordinaraj situacioj; 7) enkonduko al la Esperanta kulturo (en vasta senco); 8) du niveloj: elementa kaj perfektiga. Malgranda sekreto: la libro estas tre personeca; tial mi nomas ĝin por mi mem “lirika poemo en formo de lernolibro”. Jen kion pensas atentaj legantoj pri tiu “ĉiamverda lernolibro”: <<http://katalogo.uea.org/index.php?inf=7800#ek>>.

DUA MIRAKLO – ESPERANTO EN 16 TAGOJ

Jen sekva miraklo, kiun mi kreis. En Sovet-Unio ekzistis scienc-populara gazeto “*Himija i fiznĵ*” (Kemio kaj vivo), ege ŝatata en intelektulaj rondoj. Ĝia enhavo estis tre varia, inkluzive pensigajn scienc-fikciajn novelojn kaj konsilojn pri studado de la angla kaj japana lingvoj. Mi verkis koncizan ekspres-kurson kun tekstoj pri scienc-popularaj temoj kaj elspezis kelkajn jarojn por publikigi ĝin en tiu gazeto. Ĝi aperis en eldonkvanto 265 000 ekzempleroj kaj estis vidita de almenaŭ miliono da kleraj legantoj. Danke al tiu kurso aperis multe da esperantistoj, inter kiuj konataj rusiaj esperantistoj Valentin Melnikov, Nikolao Gudskov, Mikaelo Povorin kaj ankaŭ... la nuna prezidanto de Esperanto-USA Orlando Raola (tiutempe kubano, studento pri kemio en Moskvo). Poste mi eldonis tiun ekspres-kurson kiel libreton sub la titolo “*Esperanto en 16 tagoj*”. La nekredebla historio de tiu lernilo estas rakontita sub la titolo “*Kiel mi estis kemiisto*”: <<http://www.esperanto.mv.ru/Esp16/Postparolo.html>>.



TRIA MIRAKLO – VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

Tio estas mia internacie plej konata lernolibro. Ĝia plena titolo estas *“Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo”*. La ideon de esperantlingva lernolibro por la tria nivelo, kiu instruu liberan kaj kreaĵon de Esperanto kaj enkonduku la studenton en Esperanto-mondon, mi komencis pripensi en la jaro 1987 okaze de la centjariĝo de Esperanto. Ĉar tiutempe mi posedis unu el la plej riĉaj en la mondo privataj Esperanto-bibliotekoj, mi disponis pri abunda materialo por elekti. Mi havis grandan bonŝancon, ke la libron redaktis la erudiciulo Viktoro Aroloviĉ. Alia granda bonŝanco estis, ke Aleksandro kaj Jelena Ŝevĉenko sukcesis aranĝi, ke la grava ŝtata eldonejo *“Progreso”* en Moskvo akceptis la libron por eldono, kaj ili prespretigis ĝin. La kontraktita honorario estis sufiĉe impona. Per la ricevita antaŭpage duono de ĝi Esther

kaj mi partoprenis en la 75-a Universala Kongreso en Havano. Sed pro la subita disfalo de Sovet-Unio en la lando okazis terura inflacio, kaj la eldonejo ne havis monon por publikigi la libron. Tamen monhelpe de Aleksandro Melnikov ĝi aperis fine de la jaro 1992. Ĉar la nominala sumo de la honorario ne ŝanĝiĝis, la ricevita alia



duono apenaŭ sufiĉis por aĉeti du botelojn da ŝaŭmvino. Sed ne gravas la mono – la revo efektiviĝis! Jam loĝante en Usono, mi draste prilaboris la libron, unuavice internaciiginte ĝin, kaj en la jaro 1998 kontraktis, ke UEA reeldonu ĝin. Sed eksplodis profunda krizo en la Centra Oficejo de UEA, kiu, krom ĉio, prokrastis eldonon de *“Vojaĝo”*. La prezidantoj de UEA Kep Enderby kaj Renato Corsetti faris ĉion eblan, por ke ĝi aperu. En malfacilegaj personaj kondiĉoj Osmo Buller (ilustra redaktoro), Francisco Veuthey (brila grafikisto) kaj Roy McCoy (tekstoprilaboristo), kiuj rilatis al mia libro kiel al sia propra ido, prespretigis la libron, kaj Trevor Steele eldonis ĝin en julio de la jaro 2002. La prezento okazis dum la 87-a Universala Kongreso en Fortaleza (Brazilo). La oficistoj de la Centra Oficejo alportis kelkdekon da ekzempleroj en siaj valizoj. *“Vojaĝo”* fulmrapide disvendiĝis. Kaj en la jaro 2005 Osmo Buller, kiel reveninta Ĝenerala Direk-

toro de UEA, publikigis la 3-an eldonon. Do ankaŭ mia tria lernolibro estas siaspeca miraklo. Antaŭnelonge Osmo Buller skribis duonŝerce en Fejsbuko: “*Vojaĝo en Esperanto-lando* estas la plej populara Esperantolibro de tiu ĉi jarmilo”. Mi nomas tiun libron por mi mem “simfonio en formo de lernolibro”. Detaloj pri “*Vojaĝo*” estas legeblaj en Vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Vojaĝo_en_Esperanto-lando>. Mi aldonu, ke per “*Vojaĝo*” mi instruas en la reta Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK), kiu kreskigas novajn elstarajn figurojn en Esperantujo. Iomete pri IPKK oni povas legi en Vikipedio: <<http://eo.wikipedia.org/wiki/IPKK>>.

ESPERANTO-LANDO SENLIMA

Fakte, la plej granda miraklo okazis en la jaro 1963. Unuafoje en la historio grupo de sovetiaj esperantistoj (kun permeso de “pleja supro”) estis preparata por partopreno en la 48-a Unversala Kongreso en Sofio (Bulgario). Mi havis tre malmulte da ŝancoj trafi tiun grupon, ĉar mi havis almenaŭ kvar “pekojn”: mi ne estis membro de la Komunista partio; mi estis juna (nur 24-jaraĝa); mi estis provincano (sed ne moskvano aŭ leningradano); kaj ĉefe – mi estas judo (kio tre gravis en la ŝtato kun kaŝita ŝtata antisemitismo). UEA akceptis, ke mi faru en la Internacia Somera Universitato prelegon pri maŝina tradukado el la rusa lingvo en Esperanton, pri kiu mi faris esploron kaj tiele enkondukis maŝinan tradukadon en Esperantujojn. Tiu fakto kaj subteno de profesoro Bokarjov kaŭzis mian engrupigon. Antaŭ la forveturo el Moskvo al Bulgario evidentiĝis du fiaskigaj aferoj: 1) en Kiŝinev mi ricevis lastmomente nur permeson vojaĝi eksterlanden, sed ne la eksterlandan pasporton (mi eĉ ne sciis, ke tiaĵo ekzistas!); post du tagoj oni transdonis al mi la eksterlandan pasporton pere de estro de aviadilo fluganta el Kiŝinev al Moskvo; 2) mi ne rajtas prelegi, ĉar... mia prelego ne estis aprobita de la cenzuro (necesis prezenti al la cenzuro ruslingvan tradukon de la prelego kelkajn semajnojn pli frue). Feliĉe, profesoro Bokarjov (kiu havis altan aŭtoritaton) surpronis



respondecon pri ĉiu mia publika parolo, kaj mi ricevis permeson “de supre” por prelegi. Nur kiam nia trajno transiris la limon de Rumanio, mi ekkredis, ke vere tiu miraklo okazos. SSOD enmetis mian nomon ankaŭ por la sekvajara Universala Kongreso en Nederlando. Sed la partia organizaĵo de la Respublika biblioteko de Moldavio ne



kun Ulrich Lins, 1979

donis al mi rekomendon pro tio, ke mi ne venis al la Unuamaja manifestacio (ĉar ni veturis al Tiraspol por celebri la 5-jariĝon de nia geedziĝo). SSOD ne plu planis min por grupoj al Universalaj Kongresoj. Sekvafoje mi bonŝancis trafi Universalan Kongreson nur post 15 jaroj, en 1978, denove en Bulgario. Tiam jam ekzistis decido de Centra Komitato de KPSU pri kreo de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). Kompreneble, miajn vojaĝojn mi pripagis mem kaj estis tute feliĉa, ke mi povas partopreni la kongresojn. Mi estis en la okcidenteŭropaj UK-oj en 1979 (Lucerno) kaj 1982 (Antverpeno) – nu, mi estis tiam prezidiano de ASE. Post la UK en Budapeŝto (1983) mi perdis la eblon veturi eksterlanden pro mia fifama recenzo en la revuo “Esperanto” pri israela libro. Miaj sekvaj UK-oj estis en 1990 (Havano) kaj 1992 (Vieno); ASE tiam ne plu ekzistis, regis la perestrojko kaj ioma libero.

Malsame al multaj sovetiaj esperantistoj, mi frue ekhavis vastajn kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj. En la jaro 1972 mi fariĝis la unua sovetia komitatano de TEJO. En la jaro 2000 mi



traktado de gvidantoj de ASE kaj UEA, 64-a UK, Lucerno, Svislando, 1979

fariĝis internacia rajtigita ekzamenanto kaj akceptis diversnivelajn ekzamenojn dum Universalaj Kongresoj. Dum du jaroj mi estis membro kaj vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA kaj partoprenis en preparado de ekzamenaj taskoj. Mi estas membro de UEA ekde la jaro 1959. Mi estis la unua sovetia komitatano de UEA kaj servis en tiu ofico en la jaroj 1975-77 kaj 1989-92. En la jaro 1976 mi fariĝis la unua sovetia Ĉefdelegito de UEA kaj plenumis tiun funkcion dum 9 jaroj. Mi devis forlasi tiun postenon pro la premo el la Centra Komitato de KPSU tra SSOD en la jaro 1985. Tiu ĉi tragika-komika historio estas legebla en la rakonto “*NIA Vilnjuso kaj ILIA Jerusalemo*”: <http://katalogo.uea.org/index.php?id=912&inf=1433&recenzo=montru>.

Kaj laste: en la jaro 2005 la Komitato de UEA elektis min Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Pli frue mi estis elektita Honora Membro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj).

Listo de miaj publikaĵoj estas legebla en Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Kolker.

PLANOJ POR ESTONTECO

Estas malfacile plani malproksimen, atinginte la respektindan aĝon 75 jaroj, kio al mi okazis la 15-an de julio 2014. Tamen du konkretaj planoj ekzistas. Unue, finprepari por la eldonejo “Impeto” koncizan fulmokuson de Esperanto surbaze de mia Plena lernolibro. Due, prepari por UEA reviziitan kaj renovigitan 4-an eldonon de “*Vojaĝo en Esperanto-lando*”, por kio mi kolektas eventualajn modifojn dum preskaŭ jardeko. Iam mi revis verki neordinaran libron pri Ludoviko Zamenhof, sed la revo ne efektiviĝis. Mi kreis en Facebook paĝaron de “*Vojaĝo en Esperanto-lando*” kaj regule renovigas ĝin.

Mi regule informas per retleteroj miajn lernintojn pri Esperanto-novaĵoj. Mi estas dumviva membro de UEA, ILEI, REU, Esperanto-USA kaj ELI kaj laŭeble partoprenas ilian agadon. Kompreneble, ankaŭ la laboro en la Akademio de Esperanto kaj por la gazeto “*Monato*” neniam ĉesas. La vivo daŭras...



KAJ FINE IO GAJA

Mi volas fini per io gaja kaj mi citu el mia intervjuo al la revuo "Esperanto" (2008, n-ro 6) pri amuzaĵo dum la 63-a Universala Kongreso en Varna en 1978: "En Varna okazis oficiala traktado inter SSOD, kiun reprezentis fakestro Rafael Saakov, kaj UEA, kiun reprezentis Humphrey Tonkin, William Auld kaj Simo Milojević, pri aliĝo de ASE al UEA. En la antaŭvespero mi konsilis al Tonkin kiel paroli, por ke SSOD ekhavu favoran impreson pri UEA.



Dum la traktado ĉeestis pluraj sovetianoj; mi servis kiel interpretisto. Saakov parolis per kliŝaj propagandaj frazoj, tial mi tradukadis samtempe kun lia parolado, divenante la sekvontajn vortojn. Kelkfoje mi finis traduki, antaŭ ol li finis paroli. William Auld tiom miris pri mia tradukista "lerteco", ke poste li sendis al mi donace du siajn librojn kun subskribo "Al Boris Kolker kun admiro". Similaj traktadoj okazis preskaŭ en ĉiu Universala Kongreso dum la dekjara ekzisto de ASE, sed ne rezultis aliĝo." Kaj fine alia citaĵo el la sama intervjuo: "Anatolij Berjoza, la altrudita respondeca sekretario de ASE, revis, ke ASE aliĝu al UEA. Li esperis tiokaze fariĝi komitatano de UEA kaj havi eĉ pli da ebloj vojaĝi eksterlanden senpage. Sed ĝenerale li kaj SSOD samkiel iliaj mastroj en CK KPSU rilatis al UEA negative, ne dezirante, ke la homoj havu kontaktojn kun eksterlando. Foje Berjoza diris al mi, ke la delegita reto de UEA estas spiona servo: "Imagu, se iu demandas vin, kion produktas sekreta milita uzino en via urbo, vi, kiel delegito de UEA, devas respondi al li kaj tiel malkaŝi ŝtatan sekreton." Alian fojon li diris al mi, ke "Heroldo" estas kontraŭsovetia gazeto, ĉar tie aperis pagitaj anoncetoj de samseksemuloj kaj nudistoj ("Ili deziras, ke ni marŝu en stratoj nudaj"). Tia estis la sinteno. Nun oni malfacile povas imagi, en kia Orwell-eska mondo ni vivis."

Mia longa kaj interesa vivo en Esperanto-lando daŭras...

